


1983

MEJ-Bulteno

Informilo de:



M.E.J. estas sekcio
de Madrida Esperanto
Liceo, kies sidejo si-
tuas ĉa:

Strato ATOCHA 98, 4^a etaĝo.

MADRIDO-12

Telefonnumero: 2-30-87-98

S A L U T O

Kiam oni komencas eldoni revuon aŭ, ĉi-okaze, informilon, vere oni ne scias, kiel fari tion, kiel sin prezenti. Tial mi pensas, ke la plej simpla maniero estas diri al ĉiuj: **S A L U T O N !**.

Estas interese por la novaj gelernantoj scii antaŭ ĉio:

- A. Kio estas M.E.L.? M.E.L. (Madrida Esperanto Liceo) estas tutneŭtrala asocio rilate politikon, religion, k.t.p., dediĉanta ekskluzive la divastigon de Esperanto senserĉe de profitaj celoj.
- B. Kio estas M.E.J.? M.E.J. (Madrida Esperantista Junularo) celas iĝi ilo por krei junularan fokuson pri kulturo surbaze Esperanton.
- C. Kio estos M.E.J.-Bulteno? Ĝi estos ĉiumonata informilo pri ĉiaj aktivaĵoj okazantaj en la Liceo, kaj ankaŭ en la tuta lando. Aktivaĵoj precipe junularaj. Ĝia disdono estos senpaga kaj ĉiu intereso aŭ grupo povas mendigi ĝin.

..... 0000000.....

La bulteno konsistos ĝenerale el ses partoj:

- A.- SALUTO: enkonduko al la monataj aktivaĵoj.
- B.- MADRIDE: informoj pri ĉiuj gravaj okazantaĵoj ĉe ni.
- C.- NACIE: kongresoj, kunvenoj, H.E.F., H.E.J.S....
- C.- EKSTERE: plurajn fojojn, iuj eksterlandaj aferoj koncernas al ni.
- D.- DEZIRAS KORESPONDI: de tempo al tempo, la Liceo ricevas leterojn *Kio ja*
line restas senres- kiu ajn povas sendi adresojn por korespondi aŭ anonci junularajn
pondaj publikaĵojn.
- E.- APARTE: ĉiam restos loko por surmeti iun artikoleon aŭ amuziĵojn.
 Kunlaboru ĉi-sekcie.

M A D R I D E

- A. Generala Asambleo: La pasintan 29-an de Januaro okazis, laŭjare en nia sidejo, la Generala Asambleo. Oni elektis novajn estraranojn, kun la ĉeesto de la Prezidantino de H.E.F., S-ino. Rafaela urueña.

- B. Edziĝo de la Prezidanto: Jes, vere. La Prezidanto, Augusto, edziĝis al la denove sekretariino Alicia Ballester. Tio estis granda surprizo por ni ĉiuj. Por ili: Daŭran feliĉon!
- C. Vizitoj: Dum ĉi tri monatoj, vizitis nin: 1. Veselin Damjanov, bulgara operisto helpita de akordiono. Li oferis al ni laŭdindan kantaĉdon per Esperanto kaj ruslingvo. 2. Willi Brandenburg, germano "denaska esperantisto". Li afable solvis niajn dubojn pri Germanujo. 3. Alberto Barrocas, urugvajano kiu raportis pri sia lando pere de lumbildoj. 4. José Navarro, samlandano nia kaj sciulo pri komputiloj. Li, dankinde, uzis du tagojn por nin enkonduki en siajn studojn pri "aŭtomata tradukado" per Esperanto. 5. Fukui Masaharu, juna reprezentanto de la japana grupo Rondo Harmonia.
- C. Novaj kursoj: La lasta komenciĝis la duan de Marto. Profesoro: Augusto Casquero. Malgraŭ la farita propagando, nur ĉeestas ĉirkaŭ dek tri gelernantoj. La kurso finiĝos la 13-an de Majo.
- D. "Konversacia Rondo": oni rememoras, ke ĉiuj povas plibonigi sian Esperantnivelon ĉeestante la Konversacian Rondon. Ĝi okazas ĉiujn merkredojn je la 8-a. Temoj: Esperanta Movado, lumbildoj, diversaj temoj. Ĝin direktas nia itala samideano Gian Carlo Fighiera.

..... 00000000000

- A. M.E.J.: je la komenco, ni jam klarigis kio estas M.E.J., por funkciigi ĉi tiun novan grupon, ni bezonas ĉies sugestojn kaj apogon. Se al vi tion interesas, tuj parolu kun Jorge Bueno; telefonnumero 4-02-08-68.
- B. "M.E.J. - Babilado": por tiuj knaboj nekuraĝantaj ĉeesti la Konversacian Rondon, konsilinda estas M.E.J. - Babilado. Ĝi okazos alternajn jardojn je la 7-a. Oni traktos la projektojn de M.E.J. kaj libervolaĵojn. Ne priokupiĝu se vi ne havas mezajn nivelojn pri Esperanto: ĉeestu!, ĉar M.E.J. - Babilado estas precipe por praktiki kaj ellerni la lingvon.

N A C I E

- A. HEJS-Tendaro: de la 31-a de Marto ĝis la 4-a de Aprilo okazos en Gandia (Valencio) la VII-a HEJS-Tendaro, organizata de Hispana Esperantista Junulara Societo. Diversaj aktivajoj, konkuroj, ekskursoj, kunvenoj.... Profitu ĉi oportunecon konatiĝi kun geesperantistoj de aliaj grupoj, kaj eĉ de aliaj landoj! kaj praktiki ĉe junulara kaj amuza etoso. Kosto: 500 pesetojn, inkludata la loĝado en la Esperanta-Oazo (Esperanta Kampingo kun sportejo kaj naĝejo). Plian informon, petu rapidege al HEJS, strato Atocha 98, 4a. Madrido-12.

E K S T E R E

- A. 39a Internacia Junulara Kongreso: ĉi-jare, ĝi okazos en Debreceno (Hungario) de la 23a de Julio ĝis la 30a. Organizata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (T.E.J.O.). Korespondadreso: Hungara Es-


peranto-Junularo. Pg. 193, H-1368. Budapeŝto.

B. Internacia Infana Esperanto-Vilaĝo : Arango okazonta de la 15^a de Julio ĝis la 29^a, 1983^a, ĉefe por infanoj 10- ĝis 15-jaraj. Ilin povas akompani iliaj gepatroj. Sporto, ludoj, urbovizitado, kursoj, Fliaj informoj; Skzodowskiej-Curie 10, 85-094. Bydgoszcz, Pollando.

DEZIRAS KORESPONDI

- A. Pri numismatiko: Malzev Segej, 18 jarojn. Krasnodara kraj, ul. Krasnodarskaja, 17. Sovetunio.
- B. Kolektas insignojn, monerojn: Korĉagin Vadin, 12 jarojn. 350020 Krasnodar, ul. Babuŝkina 281/2 Kv28, Sovetunio.
- C. Pri sporto, muziko, angla lingvo: Kiseljov Oleg, 14 jarojn. 350007. Krasnodar, ul. Zaharova 43, Kv. 11. Sovetunio.
- C. Fotografio kaj turismo: juna fotoamatoro. Righi Claudio. C/o Pisa Esperanto Grupo. Via Oberdam 57. I-56100. Pisa, Italujo.
- D. Pri Ĉiuj temoj: Uĉida, 11 jarojn; Takedo, 12 jarojn; Iida, 18 jarojn. c/o Sro. Esaki Masayasu. Mamoyamacho Akiyama 28-32. Kioto, Fushimi-ku. 612 Japanio.

A P A R T E



Ne forgesu, ke la VII-a
HEJS-Tendaro alproksimiĝas.
Pretegi vian turnistran kaj... Ne
perdiĝu! Vi devas trovi la vojon al
la Esperanto-Oazo.

MEJ-Bulteno

Informilo de:



.E.J. estas sekcio
. Madrida Esperanto
sekcio, kies sidejo si-
vas ĉi:

Strato ATOCHA 98, 4^a etaĝo.

MADRIDO-12

Telefonnumero: 2-30-87-98

S A L U T O

Denove ni, MEJ. Ĉi tiu estas la dua numero de nia informilo. Oni sendis ekzemplerojn al diversaj junularaj grupoj; tamen, ni ricevis malmultaj mendojn pri ĝi. Tial, ni rememoras, ke la disdono de MEJ-Bulteno estas senpaga kaj ĉiu intereso al grupo povas mendi ĝin.

MADRIDE

- A. Kursoj: Jam finiĝis tiuj donitaj de la profesoroj Laureano, Inocencio, Miguel, Augusto, Pepe... Sed la Liceo neniam haltas: la pasintan 25-an de Aprilo komenciĝis novaj kursoj (elementaj kaj perfektigaj) finiĝonta la 30-an de Junio. Ankaŭ komenciĝos aliaj la 9-an de Majo.
- B. Ĥoro: Fine Madrida Esperanto Liceo havos la jam delonge preparota "esperanta Ĥoro". Ĉiuj povas partopreni en ĝi, senbezona de muzikaj scioj. La provludoj okazos sabatojn matene: Parolu tuj en la sekretario.

.....0000000000.....

- A. Kontaktoj: MEJ atendas respondon el la junulara asocio "Boy-Scouts" por nia propono doni al ili prelegojn pri la Esperanta movado ĉe la junularo.

N A C I E

- A. HEJS-Tendaro: La VII-a HEJS-Tendaro adiaŭis ĝis la venonta jaro. Inter aliaĵoj: oni elektis novan estraron; la revuon "HEJS-JUNECO" de nun oni faros en "Valladolid" ; oni amuziĝis multe.
- B. Andaluza Kongreso: Komence de Aŭgusto okazos en Kordovo la I-a Andaluza Kongreso. Petu pli detalan informon al: Grupo de Esperanto- I. B. "Sé-neca"; Avda. Menéndez Pidal s/n. Córdoba 4, al aliaj andaluzaj grupoj.

DEZIRAS KORESPONDI

- A. Kun samaĝa knabo: Mányi Pál; 12-jara. Štrosmajenava 21, 24420 Kanjiza, Jugoslavio.
- B. Kun samaĝa knabo: Torteli Czongor; 11-jara. Hajduk Valjko Venac 4, YU-24420 Kanizsa. Jugoslavio.

- C. Pri ĉiuj temoj: F-ino Lida kaj F-lo Soruŝ; 19-jaraj. Sendu foton. Irano
Tehrano 15 P.O. Kesto 54-297.
- C. Pri ĉiuj temoj: Biser Dimitrov; 22-jara kaj medicina studento. Strato
"Makedonija" 52. BG-9000. Varna, Bulgario.
- D. Revuoj: Aliĝu al "SEJO", leginda revuo de Sevilja Esperanta Junulara Or-
ganizo. Kosto: 130 pesetojn 4-monate. Sidejo: Strato Sol, 75, Sevilla 3

A P A R T E




"Rajdu" tra ĉi kvadrataro sakmarŝe, komenciĝante kie indikas la sageto kaj finiĝante sur la kvadrato markita per punkto. Ĉe la vojo vi trovas kuriozan proverbon de Zamenhof.

SOLVO :

Uŝu tempon estanta-n, antaŭvidu estanta-n,
memoru estanta-n.

Nia Voco

ORGANO DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO
Aprilo - Majo 1983



MADRIDA
ESPERANTO-
LICEO

C/ Atocha, 98
Madrid-12 - HISPANIO
Tel. 230 87 98

PERSONA LETERO AL VI.

Kara samideano.....

Ĉiam, kiam mi preparas tiun-ĉi revueton, mi min demandas: Ĉi iu legos ĝin? Ĉu ĝi estos utila por io aŭ iu?.

Same, nun, mi havas grandajn dubojn pri la efiko de tiu ĉi leterro persone direktita al vi: Ĉu vi legos ĝin?...Sincere, mi tre multe dubas. Kaj, se vi ĝin legas, ĉu vi iamaniere respondos?... Eĉ pli dubebla afero. Ni vidos!

Vi, kara samideano, estas unu el la cent tridek (jes, nur cent tridek!) anoj de nia Liceo kiu regule pagas vian malaltan kotizon kaj, sekve, vi ricevas, poŝtsenditan al via domo, tiun ĉi modestan "NIA VOĈO"-n (senutila por vi, se vi ne ĝin legas). Sed vi estas por ni kiel muta kaj nekonata fremdulo: vi neniam respondas... Vi estas nur bonkora kotizhelpanto, sed... ne plu.

De kiam mi ekprenis la taskon de nia revueto, miaj linioj ekde tiu-ĉi paĝo estis konstanta alvoko al vi ĉiuj, al vi persone, klopodante konvinki vin, altiri vin, rekapti vian atenton al tiu nobla idealo, kiu (mi esperas!) ankoraŭ restos iom vivanta ĉe via koro: la Esperanto movado. Mi ege klopodis esti persvadema, konvinkema, senttuŝanta, sed... neniu respondo, neniu respondis. Ni daŭrigas, kiel antaŭe, preskaŭ solaj.

Sincere, mi pensas, ke ne estas tro multe tio, kion mi petas el vi: nur, almenaŭ, unu respondon!, nur malgrandan signon por sciigi, ke vi estas ankoraŭ kun ni.

Se vi deziras montri, ke tiu ĉi letero ne estis senutila, bonvolu respondi ĉi-foje. Estus mirinde, se vi - almenaŭ ĉi-foje! - respondus per via persona vizito al la Liceo! Vi jam scias, ke ĉiu merkredo ni kunvenas, ni havas nian kutiman "Konversacia Rondo"-n, sed, ve!, ne tro multnombra, bedaŭrinde. Do, venu iun merkredon, kiam vi povus, de tempo al tempo, unufoje monate, se unufoje semajne estas tute neebla por vi. Aŭ, plej bone, memoru (notu ĝin en via agendo!), ke vi havas konstantan rendezuon kun viaj samideanoj je la DUA MĤRĤREDO ĉiumonate, ĉi tie, en la Liceo.

Se vere vi ne povas veni, sendu malgrandan leteron, poŝtkarton, ion. Se vi havas iun plondon, diru, skribu pri ĝi al ni. Se vi havas sugeston, venu kaj oferu ĝin al ni. Sed ne lasu tiun ĉi personan leteron sen respondo!

Ne forgesu, ke ni atendas vin, ke ni bezonas vin, ke ni deziras retrovi vin! Ni estas nur eta manpleno da homoj kiu ankoraŭ daŭrigas nian laboron por subteni kaj disvastigi nian Internacian Lingvon Esperanto, al kies idealo ankaŭ vi apartenas kiel membro de la Madrida Esperanto-Liceo. Kaj vi facile povas kompensi, kiom malkuraĝigas la manko de respondo, kiu igas nin pensi, ke ni laboras por nenio, ke niaj streboj estas senfruktaj, eĉ inter ni.

Se estas por vi "tute neebla" helpi al ni iomete, apogu nin almenaŭ per via presenco, de tempo al tempo.

Ni atendas vin kun malfermitaj brakoj!. Kaj ni ĉiuj vin salutas.

Sincere via,

José F. Arroyo

CARTA PERSONAL A TI...

(Para aquellos socios que todavía tengan dificultad en comprender bien la Lengua Internacional Esperanto, traducimos al castellano esta nueva carta de llamada, con el ruego encarecido de que, al menos esta vez, tengais la gentileza de responder).

Querido Socio.....,

Siempre que preparo un nuevo número de nuestra revista, me pregunto: ¿la leerá alguien?, ¿será útil para alguien o para algo?. Por eso, ahora mismo, tengo también grandes dudas sobre la utilidad de esta carta personal que te dirijo a tí, personalmente: ¿la leerás?... Sinceramente, lo dudo mucho. Y, si la lees, ¿vas a responder de alguna manera?. Aún lo dudo más. ¡Ya lo veremos!

Tú, querido socio, eres uno de los ciento treinta (sí, solo ciento treinta!) miembros de nuestro Liceo que paga regularmente su cuota mensual y, por ello recibes, enviada por correo a tu domicilio, esta modesta - y mucho me temo que casi inútil - "NIA VOĈO". Pero tú eres para nosotros casi como un extraño desconocido y mudo. Nunca respondes. Eres tan solo un bondadoso bienhechor que nos ayudas con aportación..., pero nada más.

Desde que me hice cargo de la confección de esta revista, mis líneas desde esta página han sido una llamada constante dirigida a todos vosotros, a cada uno en particular, intentando atraeros, convenceros de que nos haceis falta, confiando en volver a ganar vuestra atención hacia ese noble ideal del que - ¡espero! - todavía quedará algo vivo en vuestro corazón: el Esperanto. Me esforcé en ser persuasivo, convincente, en llegar a tocar vuestros sentimientos, pero..., ni una respuesta, nadie ha respondido. Continuamos, como antes, casi solos.

Sinceramente, creo que no es demasiado lo que os pedimos: tan solo, por lo menos, una respuesta!; sólo un pequeño signo para demostrarnos que todavía seguís con nosotros.

Si deseas mostrar que esta carta no ha sido del todo inútil, por favor, contéstanos esta vez. Sería maravilloso si, -¡al menos esta vez!- respondieras con tu visita al Liceo. Ya sabes que nos reunimos todos los miércoles y celebramos nuestra "Conversacia Rondo". Así pues, ven algún miércoles cuando te sea posible (¡haz un esfuerzo, hombre!); una vez al mes, si no te es posible una vez cada semana. O, mejor todavía: recuérdalo, apúntalo en tu agenda: el SEGUNDO MIERCOLES de cada mes, tienes una cita con tus "samideanos" aquí en el Liceo.

Si no puedes venir de verdad, escríbenos una pequeña carta, una postal, algo. Si tienes alguna queja, dínosla, escríbenos sobre ella. Si tienes alguna sugerencia, ven y háblanos de ella. Pero no dejes sin respuesta esta carta, dirigida personalmente a tí! No olvides que te esperamos, que te necesitamos, que deseamos volver a encontrarte. Somos tan sólo un pequeño puñado de socios que continuamos nuestro esfuerzo para sostener y extender nuestra Lengua Internacional Esperanto, a cuyo ideal también tú perteneces, como miembro del Liceo Madrileño de Esperanto. Y podrás comprender fácilmente cuánto desanima la falta de apoyo, la falta de respuesta que nos hace pensar que nos esforzamos para nada, que nuestro trabajo no da fruto ni siquiera entre nosotros.

Si te es "completamente" imposible echarnos una mano, apóyanos al menos con tu presencia, de vez en cuando.

Te esperamos con los brazos abiertos. Recibe un abrazo cordial de todos.

José F. Arroyo

RENKONTEN AL 1987

Kiom ajn surpriziga la afero povas aspekti, la Madrida Esperanto-Liceo situas inter la plej modela funkciantaj movadaj societoj en okcidenta Eŭropo. Tiun-ĉi opinionon mi jam esprimis kelkfoje dum kunvenoj.

Kompreneble, tio ne signifas, ke ĉio estas perfekta aŭ neplibonigebla, sed nur ke la dinamismo de nia informado, instruado, praktika aplikado kaj societa vivo superas tiun de la plejmulto de la Esperanto-grupoj en eksterlando.

Sincere dirite oni povas observi la ĉefurbajn atingaĵojn sen senti dankemon por tiuj, kiuj ofertas grandan parton de sia tempo - de sia vivo eĉ - por propagandi, instruadi, zorgi programojn, deĵoradi kaj entute certigi la bonan funkciadon de la sidejo.

Aliflanke, la supre skizita situacio de la elstareco prezentas ankaŭ negativajn aspektojn. Ni fiksas al ni tiel altajn objekti-vojn, ke por atingi ilin ni streĉis ĝis maksimumo ĉiujn niajn fortojn: la demando nun estas kiel konservi la saman streĉitecon por plue gardi la saman agad-ritmon.

Tial estus pripensinde, ĉu la momento ne venis por iomete transgliti de kvanto al kvalito de nia laboro. Nome, eble ne estus katastrofo celi, ekzemple, malpli da kursoj, kondiĉe ke ni povu dediĉi al ili pli da atento aŭ ke ni pli koncentriĝu al postkursaj agadoj aŭ ke ni organizu kursojn por specialaj kategorioj de lernantoj: profesoroj, universitatanoj, ĵurnalistoj, k.a.

Ankaŭ aliaj eroj de la komuna aktivado meritas prioritatan atenton. Inter alie, ni daŭrigu la strebadon flegi minimuman socian vivon, kiel decas al ĉiu organizaĵo: tio samtempe implikas la ekziston de regule aperanta inform-bulteno kaj de kelkaj turismaj aranĝoj, ĉefe okaze de naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj. Aliflanke, ankaŭ la daŭra varbado de membroj kaj la akiro de financaj rimedoj ludas gravan rolon.

Ni povus daŭrigi la liston de la farendaĵoj preskaŭ senlime, sed pli ol la starigo de tia listo gravas ĝia plenumo. Kaj ĉi-lasto dependas nur de la bona volo, ne de intencoj aŭ de predikoj aŭ de listoj.

En tiu kunteksto necesas substreki, ke la fina respondeco de la sukceso aŭ malsukceso de la Madrida Esperanto-Liceo dependas de ni ĉiuj, persone kaj individue. Kaj malegoisme.

Estas ripetite ĝistede, ke la Liceo ne estas ia abstrakta, transcenda kreitaĵo, ekzistantanta aparte de ni, sed ke ĝi estas ni mem. Paragfrazante la diiron de iama ŝtatestro, ni povus konkludi jene:

- ne demandu, kion la Liceo povas fari por vi kaj por Esperanto, sed, kion vi povas fari por la Liceo kaj por la internacia lingvo.

Ĉu ni provu alian vojon por niaj faroj? Ĝis nun ĉiu klopodis fari ĉion, eĉ se supraĵe. Kial ni ne specialiĝu? Supozu, ke ĉiu el ni elektas sian propran agad-kampon kaj okupiĝas nur pri unu afero, sed memstare (kvankam kunordige kun aliaj), konstante, ĝisfunde kaj akurate. Per tiu metodo ni plibonigus la kvaliton de niaj aktivaĵoj. Se en iu momento iu el ni bezonos helpon, li mem serĉu la eventualajn helpantojn inter la liceanoj, kiuj havas malpli da taskoj ol la aliaj.

Jen eblaj vojoj por ke la Liceo konservu sian elanon kaj sian honor-lokon en la Esperanto-Movado, renkonten al la Jubilea Jaro: 1987.

Gian Carlo Fighiera

Membro de la kvino por la Kvina Internacia Esperantista Kongreso, okazinta en Barcelona (5-11 de Septembro 1909) kaj prezidanto de Centra Esperantista Grupo de Madrid, partoprenis tiama artileria kapitano kiel reprezentanto de la Prezidanto de la Kvina Kongreso en Barcelona kaj de la hispana registaro en la 6-a Internacia Kongreso Esperantista en Washington (14-20 de Septembro 1910). Dum lia interveno kiel reprezentanto de nia registaro, JOSE PEROGORDO diris ke la Reĝo Alfonso XIII-a per persona letero rekomendis la lingvon al sia Ministro de Internaj Aferoj.

Por donaci la Grandan Kolringon de la Ordeno de Isabel la Katolika, Hispana Societo por Propagando de Esperanto kolektis mondonacojn. El tiu listo de donacintoj ni trovas konatajn esperantistojn kiel Codorniu, Perogordo, Ayza, San Millán, Redondo, Benavente, Monteagudo, Mac Lean, Esteban, Tuduri, Nuez, Pintado, Garzón Ruiz, kaj aliaj. Ankaŭ estis grupaj kontribuoj kiel tiuj de Esperantista Klubo de San Sebastian, "Grupo Tutmonda Espero" de Barcelona, kaj Grupoj Esperantistaj de Córdoba, Gerona, Murcia, Bilbao kaj Valencia. Entute kolektis 361,05 Ptjn.

La krucordeno estis aĉetata ĉe CEJALVO GARCIA, juvelisto kaj provizisto de la Reĝo kaj kelkaj ministrejoj, strato Cruz, 5 kaj 7, en Madrid. Ĝia kosto dividiĝis jene:

- Krucordeno, leĝa oro brilliantigita, 300 ptj.
- Leĝargenta plato kun dediĉo kaj plibonigo en la ujo kiu estas el ruza felo, 60 ptj.
- Pago al skribisto por afiŝo hispane kaj esperante verkita, por elmontri la krucordenon, 1,50 ptj.

La fakturo de la juvelisto, leteroj kaj ceteraj pruviloj de gedonacantoj estis sendita al Hispana Societo por Propagando de Esperanto.

La afiŝo tekstis jene: "Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII-a ordenis la elpensinto de Esperanto D-ro Zamenhof komandoro de la Krucordeno de Isabel la Katolika. La hispana esperantistaro donacas al sia majstro l'apudan ordenon".

La dediĉo estis: "Al la Glora - elpensinto - de la lingvo Esperanto - D-ro. L.L.ZAMENHOF.- La hispana - Esperantistaro - 5-a Kongreso."

Dum la solena malfermo de la 7-a Internacia Kongreso de Esperanto, okazinta la 21-an de aŭgusto de 1911 en la festhalo de la Zoologia Ĝardeno en Antverpeno, la reprezentanto de la hispana registaro, kapitano JOSE PEROGORDO, pendigis ĉe la kolon de D-ro Zamenhof la krucon de komandoro de Isabel la Katolika.

Aliajn Kongresojn li reprezentis la hispanan registaron. En 1917 li estis jam artileria majoro. Kiel militisto li estis artileria generalo kaj aviadisto. Post la civila milito li multe helpis por restarigon de la hispana movado. Mortis 92-jara en Madrid, la 3-an de majo 1962.

Sed, kiu konas supre menciitan personan leteron de Reĝo Alfonso la XIII-a kun rekomendo pri Esperanto por sia Ministro de Internaj Aferoj? Kiu povas informi pri ĝi?

JUAN AZCUENAGA VIERNA

Fontoj: Enciklopedio de Esperanto, pg. 214 kaj 269
 Leon Courtinat: "Historio de Esperanto", pgj. 267 kaj 269
 Pierre Janton: "El Esperanto", pg. 133, kontribuo de Ines Gaston: "Resumen conciso del movimiento esperantista en España"
 Nova Sento, Esperanta Gazeto de Bilbao, Organo de Vaska Esperantistaro, numeroj 16,20,22,23,26 kaj 27.
 Hispana Esperantisto, Ilustrita revuo monata Oficiala Organo de "Zamenhofa kaj Andaluzia Federacioj", n^o VII.
 Esperanto, ofiĉala organo de UEA, julio-aŭgusto 1962, pg. 124.

LA FILINO DE LA BOVPAŝTISTO

(Ĉerpita el la libro "Hungaraj Fabeloj", de Elek Benedek)

Cu estis, ĉu ne estis, trans la Fabeloceano vivis iam reĝido. Tiu reĝido forte decidis, ke li travagos la tutan mondon kaj ne ripozos, ĝis li trovos konvenan edzinon. Ne gravas, ĉu ŝi estas filino de reĝo aŭ tiu de malriĉulo, nur ŝi estu laŭ lia gusto.

Disvastiĝis la famo en la tuta lando, eĉ ekster ĝi, kaj kie iris la reĝido, ĉie amasiĝis la popolo por saluti lin, maljunuloj, junuloj, fraŭloj kaj knabinoj, precipe knabinoj.

Foje en vilaĝo la reĝido rimarkis knabinon inter la aliaj, kiu forte ekplacis al li. Rekte li iris al tiu knabino, interparolis kun ŝi kaj demandis: Kies filino vi estas, franjo?

- Mi estas filino de la bovpaŝtisto, reĝida moŝto - respondis la knabino.

- Ne gravas, estu filino de kiu ajn, mi edzinigos vin.

Tuj li sidigis ŝin en la kaleŝon, veturigis hejmen la filino de la bovpaŝtisto kaj ili geedziĝis farante pompan edziĝfeston.

Sed por ne konfuzi la fadenon de la rakonto, mi diru, ke antaŭ la geedziĝo la reĝido diris al ŝi:

- Aŭskultu, knabino, vi estas laŭ mia gusto, mi edzinigos vin, kondiĉe, ke vi neniam kontraŭdiros al mi. Kion mi faros, tiel estos bone, vi ne havu vorton kontraŭ tio.

Bone, pasis la tempo, ili vivis en paco. Sed foje okazis, ke malriĉulo venis por plendi al la reĝo.

- Reĝa moŝto - diris la malriĉulo -, ni iris kun mia najbaro en la urbon, kun du ĉevaloj mi, kun du bovoj li. Unu el miaj ĉevaloj havis idon. Dumvoje ni tranĉtis. Kiam mi ekiris, la ido aliĝis al la bovo de mia najbaro, kaj ne plu volis reiri al sia patrino. Tiam la najbaro diris, ke mia ĉevalido estas la lia, kaj li ne volas redoni ĝin. Reĝa moŝto, faru juĝon!

- Bone, - diris la reĝo -, mi faros juĝon, sed vi ne ĝojos pro ĝi, malriĉulo, ĉar ankaŭ laŭ mi al tiu apartenas la ĉevalido, kiun ĝi postiras.

Foriris la malriĉulo malgaje, malĝoje, ĉar eĉ ĉe la reĝo mankas justeco, sed en la alia ĉambro la reĝedzino haltigis lin kaj diris:

- Malriĉulo, mi aŭdis, kian juĝon faris mia edzo. Iru en la arbaron, kie mia edzo kutimas ĉasadi, portu kun vi reton, metu ĝin sur trunkon.

La reĝedzino ankoraŭ diris ion, sed nun tion mi ne malkaŝas, baldaŭ vi ekscios. La malriĉulo iris en la arbaron, portis kun si reton, metis ĝin sur trunkon, kaj li tenis la reton kvazaŭ li fiŝkaptus. Li eĉ ne sidis unu horon, kiam venis la reĝo. Li rigardis, rigardadis, kion faris la malriĉulo. Li ne povis senvorte elteni kaj demandis:

- Kion vi faras ĉi tie, malriĉulo?

- Mi fiŝkaptas, mia reĝa moŝto.

- Kion vi parolas, malriĉulo, kiamaniere povus havi la trunkon fiŝon?

La malriĉulo respondas:

- Tiel, kiel bovo ĉevalidon.

Ekhontis la reĝo. Tuj li ĝustigis la decidon, redonigis la ĉevalidon al la malriĉulo. Sed li tuj pensis, ke tiun ruzecon instruis al la malriĉulo la edzino.

Reveninte hejmen, tuj li diris kolere al la edzino:

- Nu, edzino, vi kontraŭdiris, kvankam vi ĵuris, ke vi neniam faros tion. Do, vi ne havas lokon en mia domo. Reiru al via patro.

La reĝedzino ploris, sed vane ŝi ploris, ĉar la reĝo ne paciĝis.

- Bone - diris la edzino -, mi foriros. Sed kion vi donos al mi pro tio, ke ĝis nun mi estis via edzino?

La reĝo diris:

- Mi donas al vi tion, kio estas la plej kara por vi, nur foriru el la domo.

La reĝedzino tuj eliris, iradis-venadis, preparis sin, poste por lasta fojo ŝi ankoraŭ al la tablo de la reĝo, por lastfoje tagmanĝi en la palaco. Kiam la reĝo rigardis flanken, ŝi miksis dormigi-

sur la tablon kaj ekdormis. La reĝedzino atendis tion, kaj ŝi vokis la servistojn. Ili portis la reĝon al la kaleŝo, kaj per ses-ĉevala kaleŝo ŝi vojaĝis hejmen al la patro, al la bovpaŝtisto.

Vekiĝante en la domo de la bovgardisto, la reĝo ĉirkaŭrigardis, kaj mire demandis:

- Kiel mi venis ĉi tien?

- Mia kara edzo, vi diris al mi: mi povas kunpreni la plej karan por mi. Por mi vi estas la plej kara, do mi kunprenis vin.

Tuj forflugis la kolero de la reĝo, ĉirkaŭbrakis, kisis la edzinon. Ili sidiĝis en la kaleŝon, vojaĝis hejmen, kaj vivis ĝis la morto kune kiel kolomboj.

ooooo0000()0000oooo

Kvankan iom malfrue (neniam estas malfrue, se la "informo" estas bona, kiel ni kutimas diri), mi transkribas por vi la jenan informon, ĉerpita el la revuo "PACO", oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado, numero 6, de la pasinta jaro 1982.

CENT MIL SUBSKRIBOJ PRI MALARMADO

Novjorko, 1 julio 1982. En hodiaŭa ceremonio, Universala Esperanto-Asocio kaj Bulgara Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj komune prezentis petskribon pri malarmado al Unuiĝintaj Nacioj. La petskribo, subskribita de 103.000 bulgaraj civitanoj, reprezentis la kontribuon de unu lando en kampanio lanĉita de la Kvakera Esperanto-Societo en 1981. La Kvakera societo, per granda anonco en la revuo Esperanto (aprilo 1981) alvokis al la parolantoj de Esperanto subskribi deklaron, kiu postulas abolicion de nukleaj armiloj kaj konvenciaj armiloj kaj "transigo de pormilita elspezado al la tutmonda forigo de malriĉeco".

"Nia asocio estas neutrala kaj senpartia pri politikaj kaj religiaj demandoj", deklaris Profesoro Humphrey Tonkin, antaŭa prezidanto de la Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj. "Tamen, ni estas organizo, kiu ĝisfunde defendas, laŭ nia statuto kaj nia laborprogramo, homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn. La rajto al vivo kaj la libereco el milito estas inter la plej bazaj el ĉiuj rajtoj kaj liberecoj".

"En la hodiaŭaj tagoj", diris Ambasadoro Krum Ĥristov, prezidanto de la Bulgara UN-Asocio, "la vorto Esperanto estas tradukebla per la vorto malarmado". Ambasadoro Ĥristov aldonis, ke Esperanto havas longan historion en Bulgario kaj estas granda kultura fronto. S-ro Jan Martenson, Vica Ĝenerala Sekretario de UN pri Malarmado, akceptante la petskribon en la nomo de Ĝenerala Sekretario S-ro Javier Perez de Cuellar, emfazis la urĝecon de la problemo de armiloj kaj la gravecon de la Dua Speciala Sesio pri Malarmado, kiu en la hodiaŭaj tagoj disvolviĝas ĉe la Ĝenerala Asembleo de UN kaj estas la kialo kaj celo de la petskribo. "Se oni eksplodigos nuklean armilon ĉi tie", li diris gestante al la panoramo de Novjorko ekster la fenestro de la UN-sidejo, "mortus sep miliomoj da homoj. Kaj ekzistas kvindek mil tiaj armiloj en la mondo".

Ĉefa organizanto de la kolektado de subskriboj en Bulgario estis la Bulgara Esperantista Asocio, kiu ricevis la apartajn laŭdojn de S-ro Martenson kaj Ambasadoro Ĥristov.

Akompanis Prof. Tonkin kaj Amb. Ĥristov, inter aliaj, S-ro Mihail Srebrev, flanko de la Bulgara UN-Misio, ges. Betty kaj Julius Manson, flanko de la Laborgrupo pri Esperanto ĉe UN, kaj s-ino Noelu Dhar, komisiito pri eksteraj kontaktoj de la Novjorka oficejo de UEA.

Informo de UEA.

Kaj jen kelkaj vortoj el la parolado de D-ro TONKIN dum la prezendo de la petskribo:

"...La Bulgara Esperantista Asocio aŭdis tiun apelacion trans la lingvaj bariloj, kaj, kune kun multaj aliaj personoj en multaj aliaj landoj de multaj politikaj konvinkoj, agis laŭe. La rezulto staras antaŭ vi hodiaŭ. Ni estas fieraj pri tiu ĉi drameca pruvo pri la efikeco de Esperanto kiel forto por la monda paco".

ESPERANTO EN ĈINAJ ALTLERNEJOJ

La instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj estas eble la ĉefa celo de la Esperanto-movado. La realigo de tiu celo signifus decidan paŝon en la disvastigo de la Internacia Lingvo kaj sekve ankaŭ en la ĝeneraligo de ĝia uzado. Kiel nun statas la aferoj, tiu ĉefa celo povus preferi nomiĝi la ĉefa revo, ĉar la Movado ne faras multe pli ol revii, ke parlamentaĵoj kaj ministerioj subite ial ekfavorecos Esperanton kaj decidus enkonduki ĝin en la lernejojn. Oni venas al tia konkludo post trastudo de tre utila dokumento sub la titolo "Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo", kompilita pasintjare de Germain Pirlot en Belgio.

En la dokumento de Pirlot oni konstatas, ke la Internacia Lingvo estas aŭ povas esti instruata en diversgradaj lernejoj de dudeko da landoj. Plej ofte tamen temas pri oficialaj permesoj instrui la lingvon neoficiale, kiel nedevigan, eksterprograman aktivecon de la lernantoj, preskaŭ ĉiam kun la kondiĉo, ke troviĝu kompetenta instruisto. Ĝuste tio lasta - pri kompetenta instruisto - montriĝas la ĉefa stumblokialo, ĉar en la menciita dudeko da landoj nur manpleno (Bulgario, Francio, Hungario, la tri baltaj respublikoj de Soveta Unio) havas sisteman altlernejan edukadon de la instruistoj en Esperanto. Kie mankas kvalifikitaj instruistoj, tie la oficialaj permesoj instrui en la lernejoj fariĝas nur unu plia ornamaĵo de la Esperanto-movado en la koncerna lando.

Ĉina Esperanto-Ligo montriĝas esti unu el tiuj landaj asocioj, kiuj sur ĉi tiu agadkampo klare distingas la revojn disde la celoj. El Pekino antaŭ nelonge venis jena informo:

"La 16an de decembro 1982, la Eduka Ministerio de Ĉina Popola Respubliko sciigis la edukajn departamentojn de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando kaj altlernejojn sub sia gvido, ke Esperanto povas esti instruata kiel unu el la nedevigaj fremdaj lingvoj. La sciigo diras, ke pro kontentigi la bezonojn de la disvolviĝanta Esperanto-laboro, en - kaj ekster - landa, kaj elkulturi nombron da Esperantaj laborantoj, la Ministerio denove validigas la "Sciigon pri la instruado de Esperanto kiel lernobjekto", faritan la 13an de aŭgusto 1963. Tio signifas, ke ĉiuj altlernejoj povas preni Esperanton kiel nedevigan lernobjekton, kaj ekde nun Esperanto povos funkcii kiel unu el la oficialaj ekzamenaj objektoj, por diplomi studentojn, promocii funkciulojn kaj varbi esplorstudentojn."

La pekina komunisto finiĝas per la deklaro, ke ĉio ĉi "favorecos kulturadon de Esperantaj laborantoj kaj plian disvastigon de Esperanto en Ĉinio". Jes, dankon! Estas eĉ pli ol nur tiel, ĉar la informo el Pekino influos ĉa disvastigon de Esperanto ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la mondo. Por ke tio vere okazu, ni devus lerni almenaŭ ion da strategio de la ĉinaj kaj de Ĉina Esperanto-Ligo. Jen kialoj:

La revalidigo de la permeso instrui Esperanton en ĉinaj altlernejoj okazas nun, kaj ne antaŭ unu jaro. Tio estas neniel hazarda, sed intenca kaj bone planita. Nome, de oktobro 1981 ĝis julio 1982 en Pekino okazis speciala kurso de Esperanto por 19 lingvoinstruistoj el 18 ĉinaj universitatoj kaj iliaj altlernejaj institucioj. Nur kiam tiuj 19 diplomitoj reiris al siaj instruistoj valoris revalidigi la malnovan permeson pri la instruado de Esperanto. Tion bone sciis Ĉina Esperanto-Ligo, kiu organizis la instruistan kurson, kunlabore kun la Fremdlingva Instituto en Pekino. Oni do unue kreis, kapabligis dudekon da instruistoj, kaj nur poste revalidigis la permeson instrui. Tiel la kutima kondiĉo en la similaj permesoj en aliaj landoj - tiu kiu tekstas "se troviĝos kompetenta instruisto" - en Ĉinio anticipe forfalis. Intertempe, en septembro 1982 en Pekino komenciĝis nova instruista kurso por la senditoj de 16 aliaj ĉinaj universitataj institucioj. Tiu kurso finiĝos en julio ĉi-jare kaj do liveros al la ĉinaj

la lerneja agado de CEL. Verŝajne sekvas pliaj instruisto-kursoj aŭ eble eĉ fondo de konstanta edukejo por la estontaj instruantoj de la Internacia Lingvo.

Tiel oni bedaŭrinde ne agas en aliaj landoj. Oni ne sekvas tiun ĉinan ordon de la prioritatoj en la agado sur la lerneja kampo. Escepto, kompreneble, estas Hungario, en kiu la lerneja instruado de Esperanto verŝajne havas la plej firmajn pozicion, ĉar oni tie ne nur oficialigis la instruadon de la Internacia Lingvo sed - jam antaŭ tio - kreis universitatan fakon, kiu liveras kvalifikitajn instruistojn. Ni ĉiuj aŭdis, ke en Francio jam de kelkaj jaroj (ekde 1979) oni elspezas amason da energio por venigi al la tagordo de la parlamento leĝproponon pri la instruado de Esperanto. Ankaŭ en Italio oni jam dudekon da jaroj aŭdas pri similaj klopodoj. En Francio la propono havas sencon, ĉar oni tie almenaŭ en tri universitatoj povas nun studi Esperanton, sed en Italio - kiom ni scias - ne ekzistas tia ebleco.

Iu devus internacie kunordigi la lernejan agadon. Iu devus tiri la internacie uzeblajn lecionojn el la hungara kaj ĉina spertoj. Tion oni atendas unuavice de la faka organizaĵo Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) sed ankaŭ de UEA kaj de ties landaj asocioj. Tamen, por ke tio okazu, necesas, ke la rilatoj inter ILEI kaj UEA moviĝu de la preskaŭ nula punkto, kie ili persiste restas dum la lastaj dek jaroj.

SM - "ESPERANTO", 1983 marto

oooooooooooooooooooo

13-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Budapeŝto, 30.VII.-6.VIII.83

Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado. La kongresa temo "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado" estos tre amplekse traktata dum la Kongreso. Oni planas amason da fakaj kunsidoj por trakti diversajn, specifajn aspektojn de la temo.

LKK volas ankaŭ amplekti fakulojn el la ne-esperantista mondo; tial ĝi dissendas varbilojn en kvin lingvoj per persvadi potencialajn interesitojn partopreni en la Kongreso pro sia faka interesiĝo pri ĝi. Laŭbezone, oni provizos interpretadon por la ne-esperantistoj. Planita estas ankaŭ starigo de ekspozicio de komunikiloj apoge al la temo.

Specialaj sciencaj aranĝoj. Kiel konate, Scienca Eldona Centro (SEC) estas la Budapeŝta oficejo de UEA; ĝi anoncas specialajn aranĝojn por la Kongreso: 1. Terminarista rendevuo por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri evoluigo de faka vortaro; 2. Kunsido de la redaktoroj de Esperantaj fakrevuoj pri ekonomigo kaj disvastigo de la scienca, teknika kaj popularscienca revuaro; 3. Kunsido pri la evoluigo de la scienca kaj teknika aplikado de Esperanto. Favorprezaj karavanaĵoj. Kiel pasintjaro, ankaŭ ĉi-jare ekzistas speciala tarifo por karavanaĵoj por grupoj de minimume 25 kongresanoj. (Por minimuma grupo de 10 personoj, Madrida Esperanta Liceo jam havas rabatitan prezon por la aviadilo: ira kaj reira flugo: 23.100 ptoj. Interesitoj, telefonu: S-ro Arroyo, Tel. 733 65 83).

Dua Bulteno presigas en Budapeŝto. Fine de januaro la Konstanta Kongresa Sekretario vojaĝis al Budapeŝto por surloka redaktado de la Dua Bulteno, kimpresigas LKK. Ĝi ampleksas informojn pri granda elekto de teatraĵoj kaj ekskursoj kaj ankaŭ proponas elekton de du diversaj Infanaj Kongresetoj, el kiuj unu estas la tradicia kongreseto, la alia estas multnacia tendaro ankaŭ por ne-esperantistaj infanoj.

Aliĝado. Ĝis la fino de januaro aliĝis 1055 kongresanoj el 40 landoj. Al tiu cifero oni povas aldoni pli ol 2000 anoncitajn el orienteŭropaj landoj, kies Landaj Asocioj ankoraŭ transpagadas la kotizojn.

(HEROLDO DE ESPERANTO", 16 aprilo)

VIVO DE NIA LICEO

- Ĝenerala Asembleo.- La pasintan 29-an de januaro okazis en nia sidejo, kun ĉeesto de la Prezidantino de H.E.F., S-ino Rafaela Urueña, la jara Ĝenerala Asembleo de M.E.L. Post aprobo de la lastjara Akto kaj financa situacio, oni elektis la novan estraron kaj starigis la novjaran programon de kursoj kaj agadoj.
- Edziĝis la M.E.L. Prezidanto.- La Prezidanto kaj animo de la Madrida Esperanto-Liceo, Aŭgusto Casquero de la Cruz, dum jaroj estis la simbolo, la enkorpiĝo mem de eterna fraŭleco. Granda estis, do, la ĝenerala surpriziĝo de la madridaj esperantistoj, kiam ili eksciis, ke Aŭgusto Casquero subite edziĝis, post kelkara fianĉiĝo. La ceremonio okazis en Valencio, la 28-an de januaro 1983. Feliĉe, la edzino estas Alico Ballester Torregrosa, la longtempa sindonema sekretariino de la Liceo, kies ĉarmo, afableco kaj laboremo jam delonge estas proverbiaj inter la esperantistoj, ne nur madridaj, kiuj konas ŝin. Al la novaj geedzoj multajn bondezirojn de longa komuna vivo! (G.C.F.)
- HEJS Tendaro.- De la 31-an de marto ĝis la 4-an aprilo okazis en Gandia (Valencio), ĉe la kampadejo ESPERATA-OAZO, la VII-a HEJS-Tendaro, organizita de Hispana Esperantista Junulara Societo. La ĉeesto de diverslandaj junaj esperantistaj grupoj estis sufiĉe multnombra kaj la etoso kaj aktivajtoj (kunvenoj, ekskursoj, konkursoj, k.t.p.), kiel kutime, estis ege interesaj kaj fruktodonaj.
- Eksteraj aktivajtoj.- La 22-an marto nia samideano Pepe Arroyo prelegis en la sidejo de la politika partio CULTURA NATURAL (universalema, ekologia kaj pacema partio), kies programo enhavas la protektadon Esperanto kiel Internacia Lingvo. La 12-an aprilo, ankaŭ s-ano. Arroyo prelegis pri Esperanto kaj projekciis esperantan filmon de lia serio "Esperanto vojaĝas" en la Socia Klubejo de la entrepreno "Standard Eléctrica, S.A.". La 15-an aprilo la MBL Prezidanto Aŭgusto Casquero kaj HEJS Prezidanto Miguel Angel Sancho partoprenis en duonhora radio-programo pri Esperanto en la radistacio Radio Cadena Española. Ankaŭ la nacia radistacio "Radio Nacional de España" invitis al nia Prezidanto Aŭgusto Casquero partopreni en unuhora programo elsendita la 25-an aprilo. Dum tiu longdaŭra programo, la radioparolistino Leonor García multe konversaciis pri Esperanto kun S-ro Casquero kaj kelkaj kanzonoj de Vaselin Damjanov kaj Oliver Tzaut estis elsenditaj. La 1-an de Majo denove la radio sin interesigis pri Esperanto kaj S-ro Casquero estis invitita ĉe la radistacio "Radio Estudio" por duonhora programo.
- Liceaj aktivajtoj.- Kadre de la kutimaj merkredaj "Konversaciaj Rondo", la vizprezidanto Juan Carlos Ruiz prelegis (la 11-an majo) pri unu el siaj "multaj vojaĝoj tra la tuta mondo", nome tiu tra Indio kaj Nepalo. Lia bri-la kaj evokiva parolado estis ilustrita per la belegaj kaj artaj lumbildoj de li mem faritaj. Ankaŭ li projekciis la lumbildojn, kiuj li faris dum la lasta HEJS tendaro en Gandia. Komprenoble, li estis ege aplaŭdita!

SEMAJNAJ PROGRAMOJ DE LA LICEO

Konstanta skemo.- Por doni al la semajnaj kunvenoj klaran kaj facile memorigeblan skemon, la Liceo adoptis jenan konstantan programon de la semajnaj merkredaj renkontiĝoj (komenc-horo: 20,30):

- la unua merkredo de ĉiu monato estos dediĉita al Estrar-kunsido: ĉiuj membroj povos ĉeesti kaj esprimi sian opinion;
- la dua merkredo estos dediĉita al mallonga kultura aranĝo en Esperanto: prelego, film - aŭ lumbild-prezentado, muzika dissaŭdigo, k.s. Sekvos libera diskuto pri la temo;
- la trian merkredon, okazos unue "Parolata gazeto" (legado de originalaj aŭ

- la kvara merkredo gastigos la supre priskribitan "Parolata gazeto" aŭ konversacian rondon.

Monata plano de la kulturaj programoj

(la duan merkredon de ĉiu monato, en la sidejo, Atocha 98, 4.a etaĝo, je la 20h.30)

- 11-a de Majo

"Vojaĝo al ekzotikaj landoj" (komentata projekciado de lumbildoj):
Juan Carlos Ruiz

- 8-a de Junio

"Elektrona muziko kaj muzika sintezilo" (kun demonstracio): Perico

- 13-a de Julio

"Pejzaĝoj kaj vilaĝoj de Hispanio" (komentata film-prezentado de la serio "Esperanto Vojaĝas"): Pepe Arroyo

- 10-a de Aŭgusto

"Kelkaj (decaj) noveloj de Boccaccio" (Parto I): Gian Carlo Fighiera

- 14-a de Septembro

"Historio de la baletoj" (kun bildoj): Platas.

En la aŭtuna ciklo estas antaŭviditaj jenaj programoj, pri kiuj la membroj estos informitaj ĝustatempe: "La filozofoj de la internacia lingvo: Leibniz, Descartes, k.a."; Miguel Angel; "Boccaccio" (Parto II): G.C.Fighiera; "Orientaj batal-arto": Juanjo.

Membroj, kiuj deziras prezenti temon, estas petataj anonci sin ĉe la kunordiganto de la programoj, G.C. Fighiera.

Imitinda laboro. - Certe imitinda kaj laŭdinda estas la laboro, kiun nia samideanino Georgette Lelievre realigas en sia kvartalo de Moratalaz. Eble ŝi estas la unua, kiu fine sukcesis introduki la instruadon de Esperanto en mezgrada lernejo: ekde la pasinta januaro, ŝi gvidas kurson bazan de Esperanto en la lernejo "Felipe II" al pli ol tridek ĝelernantoj al kiuj ŝi eĉ instruas esperantajn kanzonojn. Sed tio ne estas ĉio: ankaŭ en la Kultura Centro de Moratalaz (por plenkreskuloj kaj maladaptitaj junuloj), ŝi organizis esperanto-kursojn, kiuj estas entuziasme akceptitaj de la ĝelernantoj. Kaj ŝajnas, ke estas aliaj lokaj lernejoj, kiuj jam sin disputas la efikan kunlaboradon de S-ino Lelievre por la venonta kurso.

Nova kaj efika instrumentado. - Eldonita de "Heroldo de Esperanto", ĵus aperis "NUEVO METODO DE ESPERANTO PARA CLASES Y AUTODIDACTAS". Tiu ĉi nova metodo, verkita de konata esperantologo FERNANDO DE DIEGO (Membro de la Akademio de Esperanto) estas, laŭ mia scio, la plej kompleta kaj serioza lernolibro el ĉiuj ĝis nun aperitaj en nia lando. (Oni povas aĉeti ĝin en la Liceo).

Karavano al la UK en Budapeŝto. - La Liceo jam havas definitivajn prezojn por vojaĝo kaj hoteloj, por tiuj, kiuj estis interesitaj ĉeesti la Universalan Kongreson en Budapeŝto, de la 30 julio ĝis la 6-an aŭgusto.

Jen la prezoj aranĝitaj de la vojaĝagentejo POLITOURS, por minimuma grupo de 10 personoj:

- Flugo Madrid-Budapeŝto kaj Budapeŝto-Madrid: 23.100 ptoj.
- Hotelo kun privata banĉambro kaj matenmanĝo: 35.200 ptoj.
- Hotelo sen banĉambro kaj kun matenmanĝo : 25.000 ptoj.

Ĉar ĝi estas alta turisma sezono, estas konsilinde rezervi lokojn kiel eble plej frue kaj pro tio, oni devas antaŭpagi al la agentejo la 20% de la prezo.

Interesuloj estas petataj kontakti la Liceon kaj sendi la koncernan sumon dum la venonta samajno.

KELKAJ KONSILIOJ PRI STILO

Ni daŭrigas en tiu-ĉi numero la "konsilojn pri stilo" elĉerpitajn el la libro de F. Paulhaber "NE TIEL, SED TIEL ĈI", pensante, ke ili povas esti utilaj kaj klarigaj por tiuj, kiuj deziras perfektigi sian esperantan stilon.

En la Esperanto-literaturo oni renkontas plurajn ne tuj kompreneblajn kaj tro longajn kummetaĵojn. Ili dankas sian naskiĝon al la naciaj lingvoj, kiuj havas por tiuj ideoj nur unu vorton - kummetitan aŭ ne - kiun la aŭtoro aŭ tradukinto volis nepre esprimi same per unu vorto.

Disigo de la kummetitaj partoj, aŭ streketo inter ili, povas fari tiujn vortojn pli flue kompreneblaj, ekz.:

Ne tiel....

... sed tiel ĉi.

1. sekvinbero

seka vinbero

2. junitagoj

juniĝaj tagoj

3. glitŝuligilo

glitŝua ligilo, aŭ ligilo de glitŝuo

4. linvuzo

lingvuzo; lingvuzado

5. lingvekzercoj

lingvaj ekzercoj

6. ĝardenpiedvojo

ĝardena vojoeto

Ju pli simple ni esprimas nin, des pli facile oni nin komprenas. Frazo, kiun oni devas relegi por kompreni ĝin, ne estas bonstila, ĉar bona stilo neniam ĝenas la legadon, sed male, ĝin faciligas. Ankaŭ de parolanto ni atendas, ke li parolu klare kaj tuj kompreneble, ĉar malklaran frazon skribitan ni povas relegi, sed parolanton ni ne povas interrompi por peti, ke li rediru la lastan frazon!

Malbonan stilon oni renkontas pli ofte en tradukoj ol en originaloj. Tio estas evidente, ĉar en originalo oni inklinas al plej simpla esprimado de la pensoj, sed dum tradukado oni spertas la influon de la originala teksto. La tradukanto ja volas sekvi la originalon kiel eble plej precize. Tio estas, kompreneble, laŭdinda, sed li ne malatentu, ke la enhavo konsistas ne nur el vortoj, kiujn li devas anstataŭigi per vortoj el alia lingvo, sed ankaŭ el sentoj, impresoj, emocioj, atmosfero, k.t.p., kiuj kune kolorigas kaj nuancas la vortojn, la tutan tekston kaj tiel elvokas en la leganto plenan bildon de tio, kion la aŭtoro volis diri. La traduko devas redoniti tion. Por tion atingi, la tradukanto ofte devas ion flankeniĝi de la originalo, ĉar la esprimopovo, la esprimmaniero kaj la esprimforto en la diversaj lingvoj ne estas ĉiurilate egalaj. Por ke iu vorto aŭ teksto reliefigu, la tradukanto ne malofte devas modifi la tekston.

Por ilustriti tion, mi donas kelkajn ekzemplojn:

A. Ne tiel...

... sed tiel ĉi.

Pro tio, ke Anĉjo la Ĉasisto neniam plendis pri ĉiuj tiuj malhelpantaj cirkonstancoj en la kvar elementoj, kiujn kelka nombro de Ĉasistoj sole kulpigas, se iu venas hejmen kun malplena ĉasaĵujo, kaj ke li malofte fanfaronis pri leporoj kaj perdrikoj, kiujn li, kvankan ne hejmen portis, sed pri kiuj li estis konvinkita, ke ili nepre en iu netrovebla rifuĝejo mortis pro iliaj vundoj.

Pro tio Anĉjo la Ĉasisto neniam plendis pri la ĝenaj cirkonstancoj en la kvar elementoj, kiujn solajn kelkaj Ĉasistoj kulpigas, kiam ili venas hejmen kun malplena ĉasosako. Tial li malofte fanfaronis pri leporoj kaj perdrikoj pri kiuj - kvankan li ne portis hejmen - li tamen estis konvinkita, ke ili en netrovebla rifuĝejo mortis pro siaj vundoj.


A. Longa kaj stranga frazo! La komencaj vortoj "Pro tio ke" kaj iom poste "kaj ke" igas nin scivole pri tio, kio okazis pro tio, ke Anĉjo la Ĉasisto neniam plendis k.t.p., sed tiu alplenigo ne sekvas kaj la pensoj

NIA VOJO

ORGANO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO

OKT 1983

KROKODIL!



NE DANON

en Madrid

Jen la letero ĵus ricevita en M.E.L., per kiu oni komunikas al ni la okazigon de la Nacia Kongreso de 1987 (Jubileo de Esperanto) en Madrid.

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO
(HISPANA ESPERANTO FEDERACIO)

Apertado 119
VALLADOLID
(España)

1-an Oktobro 1.983-a

Madrida Esperanto-Liceo
Atocha, 98 4º
MADRID-12

Estimataj,

Mi informas via ke la estraro de la Hispana Esperanto-Federacio decidis, unuanime, antaŭ la invititlero subskribita de la Prezidanto de Madrida Esperanto-Asocio retifi la decidon de la Generala Asembleo de H.E.F. okazinta en Saragoza en la kadro de la 43-a Hispana Esperanto-Kongreso ke la Nacia Kongreso de Esperanto de 1.987 okazu en Madrid.

De via entuziasmo kaj laborkapablo ni certe esperas multe kaj, kompreneble, ni atendas viajn informojn rilate la preparlaboroj por la Kongreso.

Kore viaj salutas,

(Sekretario de Hispana E-Federacio)

Tio signifas por nia grupo granda honoro kaj terura respondeco. Sed ankoraŭ mankas kvar jaroj por la komenco de tia kongreso. Mi estas certa ke la helpo de ĉiu membro de M.E.L. estas vianima kaj entuziasma por ke 1987 estu la jaro de Esperanto en Hispanio.

Augusto Casquero

ESPERANTO AMERIKAS POPOLOJN

KURSO DE LA ANGLA EN TELEVIDO

La hispana televido decidis elsendi ĉiutage per sia dua programo kurson de la angla. Kiel sciite temas pro la komerce fama instrumento "Follow me" (sekvu min) kiu postulas, se oni deziras profiton, la aĉeton de libro. La elsendo mem estas dekkvinminuta propagandilo celanta la monon de la spektanto.

La afero havas grandan simbolan valoron. La estraro de TVE konsideris interese instrui nur la anglan. Tio signifas oficialan agnoskon de la angla kiel internacia lingvo, ĉar neniu alia merito esti instruata.

Mi alvokas ĉiujn esperantistojn, kaj eĉ kontraŭstarantojn de Esperanto, sed malamikoj de la lingva diskriminacio, protesti skribe ĉe ĉiuj ĵurnaloj, radiostacioj kaj televido mem. Estas necese klarigi al oficialaj instancoj, registaroj, sociaj povoj kaj amasmedioj, ke fundamenta homa rajto estas konservi la propran kulturon kaj neniu (eĉ granda poteclando) povas devigi iun paroli fremdan lingvon. Ĉiuj havas rajton konsideri sian gepatran lingvon kiel la sola internacie akceptebla. Kial de la angla?

FILIZOFIO KAJ ESPERANTO

* * *

Nova organizo, Filozofia Asocio Tutmonda, aperis en la esperanta kulturo. Ĝia celo estas disvastigi Esperanton ĉe filozofiaj rondoj kaj eldoni revuon kiu iĝos intelekta ligilo por ĉiuj filozofoj en la mondo.

La revuo nomiĝas "Simpozio" kaj ĝi estas eldonita dufoje jare. La asocio klopodos organizi estontece, je la kadro de la universaliaj kongresoj, internaciajn simpoziojn pri filozofio. La unua el tiuj okazis sukcese ĉi-jare en Budapeŝto. La revuo ankaŭ klopodos grupigi teamon por la verkado de filozofia vortaro en Esperanto.

Se vi deziras pliajn informojn pri la afero, bv. vin turni al Miguel A. Sancho (hispana delegito de la asocio) ĉu persone en la Liceo (merkredoj), ĉu skribe ĉe Marcelo Usera, 163. Madrid 12.

ESPERANTO MAGIKAS

La adreso de Madrida Esperanto Liceo aperas en la ĵus eldonita "Magika Gvidlibro pri Madrido", fama konsultilo per amantoj de la astrologio, magik-arto, orientalismo, mediuismo, k.t.p... Mi ne konas la magikan kaŭzon pro kiu nia adreso estis aldonita en ĝin. Mi nepre klarigu al la leganto de tiu libro, ke nia asocio estas reale organizo kiu klopodos, per reale lingvo, solvi realajn problemojn. Esperantismo prokaŭ egalas al spiritalismo, sed ne estas la sama!

Nia vivo

MERKREDAJ PROGRAMOJ DE LA

KONVERSACIA RONDO



Ekde septembro rekomenciĝos la semajnaj kunvenoj de la Konversacia Rondo, laŭ la jena konstanta skemo:


- (1-a merkredo de la monato: malfermita kunveno de la Estraro de la Liceo)
- 2-a merkredo de la monato: prelego kun posta diskuto
- 3-a " " " " monata festeto - komuna gustumado de manĝetoj alportitaj de la membroj
- 4-a " " " " parolata gazeto kaj libera konversacio

Aŭtuna-vintra programo de la prelegoj

- 14 septembro 1983 : Perico Vilanova "Elektrona muzikilo kaj muziko"
- 12 oktobro 1983 : Augusto Casquero de la Cruz: "Historio de Esperanto"
- 9 novembro 1983 : Gian Carlo Fighiera: "La "Decamerono" de Boccaccio" (serio de kvar prelegoj)
- 7 decembro 1983 : Marton Lengyel: "Budapeŝto kaj Hungario en filmo"
- 11 januaro 1984 : José Francisco Platas: "Historio de la baletto"
- 8 februaro 1984 : Miguel Ferrández : "La generacio de 1927".

KARAJ GIKOLEMOJ

Ni volas organizi ĉiusemajne* konversacian rondon aŭ kunvenon (= "trinkejan diskuton") por progresintoj kaj




kapablaj esperantistoj.

Estas tute malpermesite kromdigi dum ĉi tiuj "diskutoj".

Escepte, kaj okaze de la sama kunveno, rendezvous en la LICEO je la 7-a p.m.

Oni parolas principe pri aktualaj temoj, ne ne pre neŭtralaj. Ni atendas vin.

* Ĉi nur dufoje monate, aŭ ĉe malpli ofte aŭ pli malofte.....





CRONICA DESORDENADA DE UN CONGRESO

¿Habeis estado alguna vez en un Congreso Universal de Esperanto? ¿no? Pues olvidaos de como pasar el próximo verano y estudiad Esperanto y... ¡al Congreso Universal de 1984!. ¡Mejor todavía!, como es posible que vuestr cartilla no ande sobrada y el congreso del 84, en Canadá, podeis esperar hasta el 85 que, será en Alemania.

Es verdaderamente una experiencia impresionante si es que te sientes interesado por la gente, por sus costumbres, por su cultura.

Cuando la última noche de mi estancia en Hungría me despedía a la puerta de la Sede del Congreso-Palacio de los Deportes-de mis amigos polacos me sentía más universal y más española que nunca.

Porque un congreso universal de Esperanto es como una ONU pero que funciona. Una ONU verdaderamente democrática que cumple su principal objetivo acercar unos hombres a otros a través de un idioma común.

Recuerdo en que la tarde que Tomislav (un esperantista de Yugoslavia) me llevó a Radio Budapest, estábamos en la sala de locución 7 personas. Allí se manejaban 5 idiomas: húngaro, yugoslavo, francés, español y esperanto. Como así te hacen experimentar la necesidad de un idioma universal. Como en el aeropuerto de Budapest y ver que tu vuelo es retrasado una hora y no sabes que pasa porque los mensajes los transmiten en magiar.

Hay cosas que te hacen alegrarte de saber Esperanto, como hablar con un director de instituto checoslovaco, con un mecánico soviético, con un periodista yugoslavo o con un maestro japonés. O ver como después de ir a un restaurante típico con orquesta de zingaros has perdido el último metro y que des hacer de cicerone con un esperantista de Virginia y su amiga de Bruselas. Total ¿por qué?, porque has visto que llevan la estrella de cinco puntas de la amistad, que salta barreras de raza, religión, ideologías, etc. Yo en Hungría no estaba sola. No tenía que enfrentarme a la lucha idiomática sola. Por las calles de Budapest transitaban casi 6000 esperantistas de 50 países. ¿Que no sabía decirle a un taxista "al jardín botánico"? ¿Cualquier esperantista húngaro me lo escribía en un papel. Seremos de distintos países, pero él es esperantista y yo también.

Lo que no acabo de entender es por qué no crece más aprisa el Esperanto. Qué es lo que realmente se opone a su expansión por el mundo. Sirve, funciona, es fácil. ¿Qué es lo que pasa?

El Vicepresidente de Hungría prometió ayudar a la causa y numerosos cabezadores se admiraron de la lengua universal. ¿Quecará todo en palabras?. Si estas personalidades hubieran estado en la "interkona vespero" (velada para conocerse) en la que varios miles de personas de diferentes culturas bailaron y se divertieron, se habrán sentido más "efectivamente" preclives a aportar un grano de arena. ¡Aneodótico!, esa tarde un muchacho de unos trece años me sacó a bailar "agarrao". No sé ni de que país era, lo importante es que yo le entendía. Y hasta estuve un rato charlando amistosamente (he dicho amistosamente) con el intérprete que Felipe González tiene en Bulgaria. ¡Hasta quedé en mandarín la foto que nos hicimos juntos!. Es cierto que nosotros "kretedilamos" un poco (hablar la propia lengua estando entre espere...

tistas), pero cuando se acercaba alguien de otro país, Augusto, Manolo y los demás hablábamos Esperanto.

Hubo teatro, bailes regionales, música, excursiones, etc. Y también trabajo: la Academia de la Lengua, UEA, los maestros, los médicos, los ferroviarios, etc.

Aquí, en este planeta de nuestras angustias, el Esperanto camina poco a poco. Esperemos que nuestro astronauta húngaro (el primer astronauta esperantista del mundo) encuentre mundos habitados con más ganas de entenderse entre sí que la que tenemos nosotros.

Bueno, yo mientras tanto he hecho un montón de amigos que no saben español y que por el Esperanto sienten interés por España. Y a mí me han entrado unas ganas locas de conocer otros países, como por ejemplo Yugoslavia.

¡Ah, se me olvidaba! una computadora, cada vez que se pasaba por delante de ella decía "Mi salutas vin" (yo le saludo). Gentil computadora ¿no?

A U R O R A

El la revuo "NOSOTROS". Valencia, Oktobro 1983

* * *

L O T E R I O

Kiel ĝiu jare, Madrida Esperanto Liceo komencis disvendi Kristnaskan Loterion. Se vi aĉetas ĝin, eble vi fariĝos riĉa. Sed certe vi kontribuos subteni nian grupon kaj Esperanton.

Do, aĉetu aŭ/kaj vendu loterion. Kiel vi povos konstati, la numero estas ege bela. Ĉu ne?

ESPERANTO-LICEO Y H.E.L.S.

Atocha, 98-4.º MADRID-12
Tel. 230 57 98 tardes de 7 a 10

Una lengua común
Un paso hacia la paz
Aprenda ESPERANTO
Cursos gratuitos trimestrales

LOTERIA NACIONAL

Núm. 43.007

El portador juega la cantidad de OCHENTA pesetas en el número arriba indicado, para el sorteo que se celebrará en Madrid, el día 22 de Diciembre de 1983.

EL DEPOSITARIO,

Son: 80 Ptas. (Caduca a los 3 meses)

Todo recibo que carezca de sello será nulo.

AGOS: Martes de 8 a 9.30.


Se juega un concilio de 20 ptas.

Nº 2501


1983-1983

L	M	M	J	V	S	D
4	5	6	7	8	9	10
11	12	13	14	15	16	17
18	19	20	21	22	23	24
25	26	27	28	29	30	31

MI GRATULAS Nia samideano José Francisco Platas, kasisto de Madrida Esperanto Liceo, en populara maratono, gajnis belan kaj grandan pokalon. Estu tiu ekzemplo por tiuj esperantistoj kiuj sentas sin kvazaŭ "maljunaj testudej". Gratulon al Pepe.



KANTOJ



EN ESPERANTA VERSIO

- 1.- "Jam foriras ŝafistoj". Populara kanzono el Extremadura, en sudokcidenta parto de Hispanio.
- 2.- "Studentaj kantistoj de Portugalio". Fama kanto inter la grupoj de de studentoj kiuj kantas tra stratoj nokte serĉante la junan amon de la knabinoj.
- 3.- "Bopatrin'". Humora kanto, omaĝo al Antonia, patrino de Maribel. La melodio apartenas al la populara vaska kanto "Pantaleón".

1

Jam foriras ŝafistoj
al Ekstremadura
jam restas la montaro
triste obskura (malluma).

...

Jam foriras ŝafistoj
jam estas marŝanta
iliaj fianĉinoj
restas plorantaj (amantaj)

...

Jam foriras ŝafistoj
al verda paŝtejo
en la montaro restas
trista silento (soleco)

2

Jen la kantistoj de la tero luzitana
ni portas kantojn pri la vento kaj la
plenigos ni ĉiujn balkonojn kaj fenest-
trojn
per melodioj de l'malnova Portugal.

Oporto dronas en ĝiaj vinoj la monta-
kovritas per ruĝemaj floroj litoral'
verdas la "teĵo" ruĝas ambaŭ riverbor-
doj
la du koloroj de la portugala flag'

Kial kial via ter' estas ĉarma?
kial kial tre miras kiu vidas vin?
Portugal kial vi tiel amindas?
kaŭze de kio ĉiuj diras tion ĉi?

Ebla kialo estas la virinoj
eble la koron kontentigas ruĝa vin'
eble odoras bone viaj floroj
eble la sun'varmigas kaj lumigas vin.

3

Bopatrin' mia tre riĉas
do kiam ni amas ŝin
estas ŝi bienulino
juvelojn kolektas ŝi
en la testamento donis
cent milionojn al bofil'

por ke estu geedzig'
absolute malriĉegas
mia ruza bopatrin'

REKANT:


REKANT:

Bopatrin' bopatrin' bopatrin'
Bopatrin' bopatrin' bopatrin'
Bopatrin' (Bis).

post rapida geedziĝo
bopatrin' loĝas kun ni
ekde tiam mi ne dormas
ĉar ronkadas laŭte ŝi
seksan vivon ni ne havas
ĉar vekig'us bopatrin'

REKANT.

Mia edzino mensogis
ankaŭ mie bopatrin'
ŝio estis teatraĵo




J. Carlos Ruiz




Nu, jen ni ree, tute pretaj ekagi ĉi-kurse en nia Liceo. La ferioj, rilate esperantajn aferojn, sufiĉe fruktodonaj.

Neforgeseblaj la kongrestagoj en Zaragozo, kiuj restos plue en mia menso inter kabaredistinaĵoj - ho, karega kantistkafejo "El Plata"! - esperantaj konversacioj apud akvoĉambroj kaj kongrestitoj kun la hispana esperantistaro, entuziasma, diversa kaj iakaze eĉ amuze mistona.




Ĉarmaj la laborokunsidoj kaj flankaj agadoj en la Unua Esperantista Kongreso de Andaluzio, okazigita en Kordovo, kie estis precipe gejunuloj, kiuj rolis kvazaŭ ĉefkaj roluloj de tiu evento. Juĉa kvartalo, Moskeo, Alkazaro, spirhaltige belaj brunulinoj kaj... la vino. Ĉio. Liceana trupeto partoprenis ĝin, oferante malavare al la andaluza samideanaro niajn helpon kaj spiritan subtenon. Cetere, plej grava el ĉio estis tio, ke ni rekordis: dum dek du horoj ni parolis nur esperante. Ni esperu. Se post nelonge tiaj sciigoj ne aperindos ĉe niaj gazetoj, tio signifos, ke ni ja finfine enkondukis Esperanton en la esperantistajn mediojn. Tiam do, ni ekpensos pri la fina venko. Nu, flankelasu krokodiladon!. Krokodili?. Ne, dankon.



Kaj nun mi ne cerboŝtopaĉos vin plue. Nun mi nur petas vian partoprenon en la diversaj kulturaj aranĝoj, kiun ni planis plenentuziasme por irigi la pulson de nia Liceo. Tincele mi informas vin, ke nia teatra trupo, disiginte dumsomere, devas rekolektiĝi kaj pliampleksiĝi. De diversaj flankoj, i.a. de la organizantoj de la venontjara Nacia Kongreso okazigota en Seviljo, oni oferis al ni la ŝancon prezenti teatraĵon. Provludoj ekestos la dekan ĉi-monate. Oni kalkulas je la helpo kaj konsiloj de kompetenta lernanto el la Supera Lernejo pri Teatra Arto. Liceanoj amantaj aktori, desegni kaj ĝenerale iel ajn kunlabori kun ni, rapidu entrapigi!

Fine, jen vera novaĵo en niaj liceaj aranĝoj. Ekde la sepa ĉi-monate, je la sepa kaj duono oni starigos "trinkejajn konversaciojn". Temas pri kunvenoj en porjunula trinkejo (t.n. "EL DESPERTAR", strato Corredera del Leal, proksima al Glorieta Antón Martín) per kiuj ni trafos du celojn per unu sagpafo, t.e. ni plialtigos nian esperantan nivelon parolante pri ne nepre neŭtralaj temoj kaj samtempe propagandos Esperanton inter la junularo, ĝuste en medio de ĝi ŝatata nuntempe.



Ne plu. Profitplenan esperantan partoprenon kaj feliĉon.

Liceo via:



Miguel Fernández

OAZO-AMIKARO

En siaj tri vivjaroj, la ESPERANTO-OAZO ricevis la viziton de samideanoj el Aŭstralio, Britio, Francio, Germanio (F.R.), Hispanio, Hungario, Irano, Japanio, Jugoslavio, Pollando, Portugalio kaj Usono; tamen, la nombro de gastoj ne estas ankoraŭ sufiĉe granda por vivteni la entreprenon.

Tial ekzistas nun la OAZO-AMIKARO, kies anoj povas finance apogi la ESPERANTO-OAZON donante jare 1.000 ptjn. (Kompreneble eblas donaci pli-kaj ankaŭ malpli-ol tiu ĉi kvanto). La subtenantoj ricevos almenaŭ dufoje jare informon pri la evoluo de la «Oazo» kaj 20% rabaton.

Do, se vi deziras helpi tiun ĉi malgrandan «Esperantion», bonvolu ĝiri vian donacon al Aquiles Sanz (Poŝtkonto n-ro 04954829) Valencia, aŭ liveri ĝin okaze de via vizito al kampadejo. Poŝtadreso: Aquiles Sanz (Apartado 171), Gandia (Valencia) —Hispanio—.

UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Apartado 119
VALLADOLID

Prezidantino

Maria Rafaela Uruña Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12, 2º C
Tfno: (933) 260086
VALLADOLID-11

Libroservanto de H. E. F.

José González Suárez
Apartado 119
VALLADOLID


ĈEFDELEGITO DE U. E. A

Juan Azcuénaga Vierna
Gral. Dávila, 127, portai 7, 2º lz.
Tfno: (942) 339437
C. Postal: 03548531
SANTANDER

H. E. J. S.

Atocha, 98, 4º
Tfno: (91) 2308798
MADRID-12


MI PAROLAS ESPERANTE



MI NE PAROLAS ESPERANTE




BICIKLISTA ESPERANTA MOVADO INTERNACIA
POŝTKONTO: 80-54372 SVISLANDO ZÜRICH



HISPANA ESPERANTA JUNULARA SEKCIO

- Prezidanto: Miguel A. Sancho (Madrid)
- Vicprezidanto: Ana Mª Ranero (Logroño)
- Sekretario: Natividad Millán (Madrid)
- Kasisto: Jorge Bueno (Madrid)
- HEJS-komitataro en TEJO: Carlos N. M. (Valencia)



Nova glumarko ĵus
eldonita DE H.E.F.

Per alglui al viaj korespondadoj, Hispana E-Federacio ĵus eldonis modernan dukoloran memglueblan markon. La prezo po dok ekzempleroj, minimuma kvanto, estas 80 p-taj. Ni atendas viajn mendojn.




Nia Voĉo

ORGANO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO

Nov-Decem 1983

Ĉu vi venos al
la "Esperantaj litaj
rondoj?"



Renkonten al 1987

Kiom ajn surpriziga la afero povas aspekti, la Madrida Esperanto-Liceo situas inter la plej modele funkciantaj movadaj societoj en okcidenta Eŭropo. Tiun-ĉi opinionon mi jam esprimis kelkfoje dum kunvenoj.

Kompreneble, tio ne signifas, ke ĉio estas perfekta aŭ neplibonigebla, sed nur ke la dinamismo de niaj informado, instruado, praktika aplikado kaj societa vivo superas tiun de la plejmulto de la Esperanto-grupoj en eksterlando.

Sincere dirite, oni ne povas observi la ĉefurbajn atingaĵojn sen senti dankemon por tiuj, kiuj ofertas grandan parton de sia tempo -de sia privata vivo eĉ- por propagandadi, instruadi, zorgi programojn, deĵoradi kaj entute certigi la bonan funkcion de la sidejo.

Aliflanke, la supre skizita situacio de elstareco prezentas ankaŭ negativajn aspektojn. Ni fiksas al ni tiel altajn objektivajn, ke por atingi ilin ni streĉis ĝis maksimumo ĉiujn niajn fortojn: la demando nun estas kiel konservi la saman streĉitecon por plue gardi la saman agad-ritmon.

Tial estus pripensinde, ĉu la momento ne venis por iomete transgliti de kvanto al kvalito de nia laboro. Nome, eble ne estus katastrofo celi, ekzemple, malpli da kursoj, kondiĉe ke ni povu dediĉi al ili pli da atento aŭ ke ni pli koncentriĝu al postkursaj agadoj aŭ ke ni organizu kursojn por specialaj kategorioj de lernantoj: profesoroj, universitatanoj, ĵurnalistoj k. ax.

Ankaŭ aliaj eroj de la komuna aktivado meritas prioritatan atenton. Inter alie, ni daŭrigu la strebadon flegi minimuman socian vivon, kiel decas al ĉiu organizaĵo: tio samtempe implicas la ekziston de regule aperanta inform-bulteno kaj de kelkaj turismaj aranĝoj, ĉefe okaze de naciaj kaj internaciaj

renkontiĝoj. Aliflanke, ankaŭ la daŭra varbado de membroj kaj la akiro de financaj rimedoj ludas gravan rolon.

Ni povus daŭrigi la liston de la farendaĵoj preskaŭ senlime, sed pli ol la starigo de tia listo gravas ĝia plenumo. Kaj ĉi-lastata dependas nur de la homa volo, ne de intencoj aŭ de predikoj aŭ de listoj.

En tiu kunteksto necesas substreki, ke la fina respondeco de la sukceso aŭ malsukceso de la Madrida Esperanto-Liceo dependas de ni ĉiuj, persone kaj individue. Kaj malegoisme.

Estas ripetite ĝistede, ke la Liceo ne estas ia abstrakta, transcenda kreitaĵo, ekzistanta aparte de ni, sed ke ĝi estas ni mem. Paragfrazante la diron de iama ŝtatestro, ni povus konkludi jene:

- ne demandu, kion la Liceo povas fari por vi kaj por Esperanto, sed kion vi povas fari por la Liceo kaj por la internacia lingvo

Ĉu ni provu alian vojon por niaj faroj? Ĝis nun ĉiu klopodis fari ĉion, eĉ se supraĵe. Kial ni ne specialiĝu? Supozu, ke ĉiu el ni elektas sian propran agad-kampon kaj okupiĝas nur pri unu afero, sed memstare (kvankam kunordige kun la aliaj), konstante, ĝisfunde kaj akurate. Per tiu metodo ni plibonigus la kvaliton de niaj aktivaĵoj. Se en iu momento iu el ni bezonos helpon, li mem serĉu la eventualajn helpantojn inter la liceanoj, kiuj havas malpli da taskoj ol la aliaj.

Jen ebla vojo por ke la Liceo konservu sian elanon kaj sian honor-lokon en la Esperanto-Movado, renkonten al la Jubilea Jaro: 1987.

Gian Carlo Fighiera

La individua libereco en la moderna mondo **La teatraĵo de Lengyel aplaŭdita**

MARTON LENGYEL: Vic-ĝenerala direktoro de la Hungara Turismo, esperantistiĝis en 1980. En 1981 li verkis teatraĵon "Ĉu vi jam vidis la pied-signojn de la Profeto?", kiu estis ludata en Esperanto antaŭ la Eŭropa Turisma Komisiono (ne-esperantista) kaj dum du Universalaj Kongresoj.

En 1980 li kuraĝe defendis Esperanton dum la Monda Turisma Konferenco en Manila, antaŭ la reprezentantoj de 107 registaroj. Post du-semajna baraktado li sukcesis, ke la Fina Deklaracio de la Konferenco eksplicite rekomendu Esperanton.

En 1983 li estis Vic-prezidanto de la L.K.K. de la Universala Kongreso en Budapeŝto. Ek de Julio li deĵoras en Madrido kiel konsultisto de la Monda Turisma Organizaĵo.

Ni bonvenigas lin elkore.

La estraro de M.E.L.

VENONTAJ PRELEGOJ

- 14 Decembro : Pepe Arroyo "Folkloro arto ponto inter la popoloj" (Filmo).
- 11 Januaro : José Fco. Platas "Historio de la baletto".
- 8 Februaro : Miguel Angel Sancho "La internacia lingva problemo en la evoluo de la filozofio".
- 14 Marto : Gian Carlo Figuiera "Tri noveloj el la Dekamerono de Boccaccio".
- 14 Aprilo: Augusto Casquero: "Historio de Esperanto".

1983

JARO INTERNACIA DE LA KOMUNIKADO

HISPANOJ

VASKA LINGVO (EŬSKERA)

La Vaska Lingvo, estas idiomo kiu devenas el la pralingvoj de la Ibera Duoninsulo. Ĝi jam ekzistis, en formo nekonata por ni, antaŭ tri mil jaroj. Ĝi estas la sola restaĵo en la tuta Okcidenta Eŭropo. Ĝi estas izolita lingvo, sen parencoj (almenaŭ konataj de ni). Vaska lingvo ne estas indoeŭropea.

Laŭ kelkaj lingvistoj ĝi estas iamaniere malgrandskale parenco de la kaŭkasaj lingvoj, pro kelkaj vort-similecoj de nekonata deveno. Ili, vaska lingvo estus parto de la t.n. familio eŭsker-kaukasa.

Ankaŭ ŝajnas ke ekzistas vort-simileco kun la kamitaj lingvoj, sed ĉi tio povas esti originata de simpla kontakto tra Afriko.

Aliaj lingvistoj pensas ke eŭskera kaj ibera estas sama lingvo.

Ankaŭ eŭskera ricevis pruntajn vortojn kaj morfologiajn elementojn el indoeŭropeo, el latin kaj el kelkaj aliaj romanidaj lingvoj, pere de loka kontakto.

Ŝajnas ke antaŭ du mil jaroj la vaska lingvo etendiĝis tra la tuta nordo de Hispanio, ĝis Mediteraneo. Pere de la toponimoj (geografiaj nomoj) oni povas pruvi ke ĝi etendiĝis tra la Alta Aragono, ĝis kunjo kaj Katalunio (pirenea), ĝis Mediteraneo. Norde eble ĝi etendiĝis ĝis la rivero Nerviŭn.

La vaska lingvo estas disigita en dialektoj, subdialektoj kaj regionaj kaj lokaj manier-elparoloj.

Laŭ René Lafon, la disdivido de la diversaj vaskaj dialektoj estas la jena:

VIZKAINO

GIPUZKOANO

LABORTANO

Norda Altonavaro

Malaltnavaro Okcidenta

Altonaravo Suda

Malaltnavaro Orienta

SULETINO

En literaturo nur estas uzataj la dialektojn VIZKAINO, GIPUZKOANO, LABORTANO, kaj SULETINO.

Aliaj vaskaj dialektoj estas Baztano, Sakzarano, Ronkalano. Ĝenerale, oni povus diri ke preskaŭ ĉiu malgranda vilaĝo havas propran dialekton.

VASKA TEKSTO

Ire itza

Satalur pillak berritzen ditun aize gorria sortzean, nere begiak erneko ditun ire itza etzutean.

Illaun-ikatza gorri ipintzen din arnasarik legunenak: aurpegi illun au kenduko liken ire itzik laburrenak.

Erruki dezan aurpegi il otz au itz arin-arin batekin; orduan noski argituki den ire itz biguñarekin

ESPERANTA TEKSTO


Via vorto

Kiam frosta vento aperos kiu renovigos la ruĝajn-"mogotojn" miaj okuloj ekvivos, aŭskultante vian vorton.

La plej malpeza kaj milda blovo kovras la karbojn per cindreroj la domaĝo en tiu vizaĝ'forpelus la plej mallongan vorton vian

Kompatiĝu je tiu malgaja vizaĝo dirante tre mildan vorton; nur tiam sendube ĝi ekbrilus pro via milda kaj delikata akcento.

Augusto



NIA

KUIREJO

POLA FROMAĜKUKO

Ingrediencoj:

500 gr. da blanka fromaĝo (unue elakvigita bone); 5 ovoj; 200 gr. da pudro-sukero; 150 gr. da butero; vanilio, sekaj vinberoj; oranĝo-ŝelo (antaŭe kuiritaj en sukero).

Preni prefere argilan kaserolon, enmeti en ĝin la tutan fromaĝon, buteron (sufiĉe molan, do antaŭe forpreni el glaciŝranko), sukeron kaj 5 ovo-flavojn. Kirli ĉion per "mixer" (elektra) ĝis la maso fariĝos glata. Aparte frapi (mixer) ovo-blankojn ĝis "neĝo", delikate miksi kun la antaŭa maso, aldoni vanilion, oranĝo-ŝelon, sekigitajn vinberojn. Ĉion miksi. Oni povas aldoni unu kuleron da "manao".

Antaŭe lumigi la fornon. Prepari tortujon: ŝmiri interne per butero, aldoni la raspitan sekan panon. Enversi la fromaĝmason kaj enmeti en fornon. Lasi 40-50 min. (la supro devas esti helbruna).

Kiam preta, ne forpreni el la forno, nur poste elpreni. Kiam tute malvarma, forigi el la tortujo, teni en glaciŝranko. Servi ĉiam el glaciŝranko. La kuko estas pli bona, se preparita du-tri tagojn antaŭe, sed minimume unu tagon antaŭe.

El Ada Fighiera Shikorska

K I O N N I P O V O S F A R I E N L A L I C E O

- 1.- Listi la adresojn de la membroj kiuj pagas kutime (Asun)
- 2.- Listi la memnumerojn kiuj ne abonis la kotizojde 1983 (Platas)
- 3.- Escribi leteron al membroj listitaj en 2 por rememorigi la pagon (Ines)
La letero povas esti sendita kun "Nia Voĉo"
- 4.- Purigado de la trinkejo kaj aĉetado de trinkaĵoj (uzuloj) +
Por la aĉetado oni devas telefoni al "Coca-Cola" kaj "El Aguila" Miguel Fdez
kaj mendi skatolojn de biero k.t.p. (Juan Carlos scias la numeron)
Oni devas doni la malplenajn skatolojn kaj la monon al Maria, la
porĉistino.
- 5.- Ni bezonas helpon por skribi grandan liston kun la nomoj de la per- (voluntuloj)
sonoj kiuj interesiĝis pri esperanto kaj venis al la Liceo. Juan Carlos
Ĝi estas peza tasko sed du aŭ tri personoj povas finiĝi frue
- 6.- Purigado kaj pentrado de la "malgranda ĉambro" (Arroyo +
Ni pensas meti liton en tiu ĉambro kaj oferi ĝin al esperantistoj voluntuloj)
- 7.- Ordoni kaj klasifiki la aĵojn de la Biblioteko: fotografiaĵoj, (Lupe + Ines
propagando, afiŝoj, ĵurnaloj, revuoj k.t.p. + Asun)
- 8.- "Nia Voĉo" la revuo de la Liceo (Ĉiuj) +
Ni esperas viajn artikolojn, spritaĵojn, desegnojn k.t.p. Augusto
Sendu ĝin al Augusto
Se la artikolo estas sufiĉe bona oni povas akcepti hispane
- 9.- La Konversacia Rondo de la Liceo okazas merkrede. (Ĉiuj)
La monata programo estas jene:
1^a merkredo Diskuto pri funkciado de la Liceo
2^a " Prelego, filmo, k.t.p.
3^a " Bankedo. Ne forgesu manĝaĵo aŭ trinkaĵo
4^a " Parolata Revuo
- 10.- Horo. Sabate matene provas (Perico)
- 11.- Grupo de Teatro (Miguel Fdez)

LA LICEO FUNCIOJ SE ĈIUJ LABORAS IOMETE

SE VI DEZIRAS KUNLABORI, BONVOLU, PAROLI KUN LA PERSONO KIU APERAS EN LISTO

ELDONAĴOJ

El Pais publikigis, en sia dimanĉa suplemento, anoncojn pri la kursoj de la Hispana Instituto de Esperanto. (Barcelono) kaj pri la kurso de la Madrida Esperanto Liceo. Ankaŭ diris ke la venontan jaron okazos en Madrido Internacia Kongreso de Esperanto, ĝi estas malvero, la 1984 Internacia Kongreso okazos en Vanĉuveno.

Mundo Obrero propagandigis niajn kursojn

La Guia del Ocio ekde kelkaj monatoj anoncas la kursojn de la Liceo.

Bedaŭrinde la anoncetoj de "El Pais" kaj "Mundo Obrero" aperis kiam la kursoj jam estis komencitaj kaj kelkaj gelernantoj preferis komenci la novan kurson

.....
.....

En la "Encyclopedia of Associations". (Enciclopedia de Asocioj). Usono-1981

aperis la jenajn esperantajn asociojn:

	<u>bulteno</u>	<u>fondita</u>	<u>membroj</u>
UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO.	Esperanto	1907	32.000
Universala Medicina Esperanto Asocio	Medicina Int.	1908	350
Amerika Esperanto Instituto Asocio	Bulteno	1961	
Kristana Esperantista Ligo Internacia	Dia Regno	1911	1.300
Amerika Katolika Esperanto As.	Altaj Esperoj	1967	53
Esperantaj Studoj Fondaĵo		1968	
Norda Ameriko Esperanta Ligo	Newsletter	1952	750
Komerco kaj Industrio Esperanta Inst.		1963	
Internacia Katolika Unuigo Esperantista. Espero Katolika		1910	1.600
Internacia Scienca Asocio Esperantista	Scienca revuo	1906	600
	Geologio Intern.		

Kvakera Esperanto Asocio

LUPE

Unue estis F. Umbral en "El País" kaj nun Forges en sia historio, ambaŭ citas Esperanton kiel stultaĵo aŭ ŝercaĵo.

Esperanto
★ estas
moda

25 DE MARZO DE 1880: 50.000 VALIENTES MARRUQUINES DE LA CABILA DE WAD-RAJ SE ENFRENTAN A 11.000 ESPAÑOLES DURANTE 16 HORAS. A COSTA DE 137 MUERTOS Y 1.124 HERIDOS, NUESTROS TATARABUELOS LOS RARON. POR UNOS AÑOS, PACIFICAR A LOS INQUIETOS ESPERANES.

¿TE ACUERDAS DE AQUEL DÍA QUE IBAIS DE PATRULLA Y EN EL BARRANCO DE AYNA QUE HONDO OS ATACARON?

SI

BUENO, PUES EL QUE TE TIPO EL CARTUCHO DE POLVORA A LA NASAL FUI YO

ESO NO ES NADA: LA IDEA DE SUSCRIBIR A TODOS LOS PRISIONEROS AL BOLETIN DE LA SOCIEDAD ESPERANTISTA DE COSLADA, FUE DE AQUÍ EL CHACHE



NIA VOĈO estos sendota al Forges dum kelkaj monatoj. Ni kondomnas

La Liceo, amike, kondomnas al li sed li povas liberiĝi de tiu kondomno per la desegnado de 6 ŝpritaĵoj pri Esperanto, unu el ili devas esti publikitaj en "Diario 10" la 15^a decembro kaj la aliaj estos sendotaj al la Liceo.

Lupe komunikis lin la "juĝodecido" per letero datita 22^a novembro kaj sendis la unuan numeron de "Nia Voĉo".

Ni rimarkas ke en Coslada ne ekzistas Esperanta Asocio.

Umbral y el esperanto

"De ahí que el intento de impersonalizar o internacionalizar un idioma sea tan estúpido como el esperanto", escribió Francisco Umbral en su *Spleen de Madrid* el 9 de octubre. Si uno no estuviera curado de espanto sería para quedarse atónito ante el caso de que una lengua pueda adjetivarse de estúpida por un hombre que ha hecho del español literario su instrumento vital. Las lenguas son neutras, como las matemáticas; los que las usan pueden ser Pindaro, Shakespeare, Rulfo o pastores oscuros de léxico reducidísimo.

El esperanto es una lengua. Una lengua con todos sus atributos. Yo he editado libros que de su original en esperanto han sido traducidos a otras lenguas, uno de ellos hasta a 10 lenguas étnicas o nacionales.

Hay una conciencia lingüística esperantista, un pensamiento colectivo que ha producido obras originales, especialmente poemas, intraducibles, o apenas traducibles, a otras lenguas.

El arte lo crea el talento, en Islandia o en Suráfrica, en Nicaragua o en Japón, no el hecho de que lo escrito esté en este o en aquel idioma. Una página no es buena por estar en latín, español o ruso: lo es merced al talento creador de quien la escribió. Vale la pena estudiar y conocer el esperanto para poder admirar una serie de valores estéticos que un grupo de espléndidos artistas originales ha creado en esta lengua, para poder saborear las cualidades espontáneas de su originalidad.

Los españoles tendemos a insultar lo que desconocemos. Parece

que Umbral no es una excepción. Lo siento, pues yo había admirado en él —cuya obra literaria he leído y poseo en su mayor parte— otras propiedades. / J. Régulo. La Laguna (Tenerife).

"El país" 9.10.83

LUPE

Pigmaliono estis greka skulptisto. Li iam faris belegan skulptaĵon kiu reprezentis virinon.

Ĉi tiu skulptaĵo estis tiel perfekta ke li komencis ĝin ami.

Pigmaliono petis al la dioj de la Olimpo ke, per miraklo, tiu skulptaĵo fariĝu virinon.

Jupitero faris la miraklon, kaj Pigmaliono edziniĝis la skulptaĵon.

La historio nur rakontis ĉi tion, sed la historio estas pli longa. Ĝi ne rakontas kion okazis dum la nokto.

Pigmaliono kaj sia edzino estis en la lito kiel edzo kaj edzino, sed, subite la miraklo malaperis.

Se vi havas bonajn orelojn vi certe aŭdos la kriegojn de Pigmaliono kiuj resonas ankoraŭ ĉe l'Olimpo.

Leopoldo H. Knoedt

Blas Pocurull

LA SEP MORTAJ PEKOJ DE (PSEŬDO)ESPERANTISTO

1. Ne progresi pri lernado de la lingvo.

Sekve: resti eterna komencanto. Kiel tia, ĉiam krokodili: telefone, en publikaj lokoj kaj eĉ en la klubo mem; maksimume li sukcesos balbuti, tiel prezentante tristan bildon por vizitantoj kaj mokataĵon por neesperantistoj.

2. Tamen akcepti roli kiel instruanto.

Sekve: pro manko de kompetento adopti neadekvatan instrumetodon kaj materialon, tiel fortimigi por ĉiam bonajn elementojn.

3. Zorgante nur la eksteraĵojn, neglekti la riĉajn latentojn de la lingvo.

Sekve: ne partopreni kulturajn aranĝojn en la klubo: parolado, deklamoj, kantado, teatraĵoj; paradi antaŭ eventualaj vizitantoj aŭ aliaj interesatoj pri la esperanta kulturo, montrante la bibliotekon de la klubo, sed mem neniam legi ion ajn.

4. Ne subteni la ĉefan faktoron de la internacia kulturo kreita de Esperanto, nome ĝian literaturon.

Sekve: nek abonon revuojn, nek aĉeti librojn, tiel bankrotigante la eldonistojn kaj fortimigante la verkistojn.

5. Ne efektive aliĝi al sia nacia movado.


Sekve: partopreni neniajn renkontiĝojn enlandajn, aŭ partoprenante, tion fari nur turisme, alportante nenion kontribuon krom la aliĝkotizo.

6. Efektive ignori la internacian movadon.

Sekve: ne partopreni en internaciaj aranĝoj, kiam tio eblas; ne aŭskulti radioelsendojn aŭ ilin aŭskultinte, tamen ne sendi iam kaj tiam poŝtkarton al la stacio por garanti la daŭrigadon de la elsendoj; ne flegi almenaŭ unu eksterlandan korespondadon; se fakulo, ne agi internacie en sia fako, tiom eksterkiom internlande.

7. Se elektite-estro de la klubo, tiel sin eternigi, ĉu oficiale, ĉu kiel griza eminenco.

Sekve: rekte kontraŭstari aŭ kaŝe subfosi ĉiun proponon, kiu povus ŝanceli la akiritan pozicion, ĉefe se ĝi venas de la pli junaj.



LA ESPERANTOMOVADON NE
INTERESAS TIOM LA KVANTO,
KIOM LA KVALITO.



KRISTNASKAJ


Tan, tan

Tan, tan, iras tra l' dezerto
 tan, tan Melĉor kaj Gaspar
 tan, tan nigrulo ilin sekvas
 de ĉiuj nomata
 reĝo Baltasar.


Tan, tan, vidas ili stelon
 tan, tan, vidas brili ĝin
 tan, tan, tiel pura kaj bela
 ke ĉiuj ĝin sekvis
 por scii la fin'

Tan, tan, laciĝas kamelo,
 tan, tan, laciĝas pro irad'
 tan, tan, ĉar ĝi estas ŝargata
 per mirho kaj incenso,
 por kiu estos ĝi ?

Tan, tan, haltiĝas stelo,
 tan, tan, super stalet'
 tan, tan, la reĝoj oferas
 donacojn portatajn
 por la infanet'



KANTOJ *



La fiŝoj

En la stalo de Belem
 estas stel', sun' kaj luno
 Virgulino kaj Josefo
 kaj la infano sur lulilo.

REKANTAĴO

Sed rigardu kiel trinkas
 la fiŝoj en rivero
 sed rigardu kiel trinkas
 por vidi la infaneton

Trinkas kaj trinkas
 kaj ree ili trinkas
 la fiŝoj en rivero
 por vidi la infanet'

Maria lavas vesteton
 kaj sekas ĝin sur planteto
 la anĝeletoj kantante
 kaj planteto floriĝante.

REKANTAĴO

Maria estas lavante
 per sapo bonodorante
 ŝiaj manetoj vundiĝis
 ho manoj de mia kor'

REKANTAĴO

Alicia kaj Augusto